

eLIBRO

Lakshmiswar Sinha

Tri bengalaj fabeloj



I N K O

Lakshmiswar Sinha
TRI BENGALAJ FABELOJ

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-111-9

inko@omnibus.se

http://www.omnibus.se/inko

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

AŬGUSTO 2001

Antaŭparolo

Post granda hezito tiuj fabelaj rakontoj estas senditaj al la presejo. La kaŭzo de mia hezito estas la penso, ke en nia realeca tempo la legantoj havas negativan ĝuon de fabeloj. Mi ne estas certa, ĉu mi pravas aŭ ne. Sed rakontu al iu nuna knabo: “Estis iam reĝo — — —,” tuj li influita de la realeca tempa spirito demandos al vi: “Dum kiu tempo la reĝo regis? Kio estis lia nomo?”

Tamen laŭ la instigo de miaj amikoj nun mi elsendas kelkajn rakontojn el mia provizejo, esperante ke eble tiuj ĉi donos iom da plezuro. Estas fakto, ke multaj hindaj fabeloj jam estas tradukitaj en diversajn naciajn lingvojn, eble eĉ tiuj ĉi samaj. Tamen mi eldonas ilin, esperante ke almenaŭ ili povos servi al komencantoj pro la facila teksto.

Stockholm, 10-aŭ de januaro 1930

Lakshmiswar Sinha

La dio, la malriĉulo kaj la mirindaj potoj

Gunadhar estis tre malriĉa. En lia familio restis neniu alia. Li estis kreskinta de sia infanaĝo sur la sino de la malriĉeco. Nun li estis junulo. Oni povas esti riĉa aŭ malriĉa, sed la juneca deziro estas ĉiam sama por ĉiuj. Unu tagon li edziĝis kun najbara junulino kaj prenis ŝin al sia hejmo.

La edzino venis al sia nova hejmo kaj vidis, ke tie ĉio estas en malordo. La edzo neniam pensis pri ordo. Li estis vera vagabondo. Kelkaj tagoj pasis. La edzino ne plu povis toleri la staton de la aferoj. Iun tagon mankis al ŝi fornligno por prepari la manĝaĵon. En la vespero, kiam Gunadhar venis hejmen por manĝi, anstataŭ manĝaĵon li licevis insulton de sia edzino. "Vian vagabondecon mi ne povas toleri plu. Hodiaŭ manĝaĵo ne ekzistas!" kun akra kaj riproĉa voĉo ŝi diris.

Jam antaŭe Gunadhar suferis multon de la malriĉeco. Sed malriĉeco estis tre kutima afero por li. Nun la unuan fojon li komprenis, ke oni ne povas vivi nur per amo. Li ne sciis, kion respondi. Dume pro lia silento la edzino koleriĝis iom pli kaj rekomencis siajn riproĉojn.

Gunadhar estis tre konsternita. Li ne sciis, kiamaniere li povu trankviligi sian edzinon, nek kiamaniere li plibonigu sian staton. Ĉar ĝis nun li vivis la vivon de sentaŭgulo.

Kelkaj tagoj pasis. Gunadhar cerbumis por trovi rimedon kontraŭ sia malriĉeco, sed ju pli li pensis, des pli lia koro farigis peza.

Post longa pensado li trovis nur unu vojon por solvi la problemon. De sia infaneco li aŭdis multon pri la potenca dio Bidhatapuruso, kiu povas plenumi ĉiujn dezirojn de la homoj. "Ĉu estas vero? Mi devas provi," li murmuris por si mem. Kaj iun tagon li foriris por preĝi al la dio. Sed li ne diris eĉ unu vorton al sia edzino pri la afero.

Li eniris tre profundan kaj malproksiman arbaron, kie tute ne ekzistis homoj, kaj tie li komencis preĝi al la dio. Fermitate siajn okulojn li alvokis lin kun sia tuta koro. "Ho, ĉiopova, ĉu vi restos silenta antaŭ la alvoko de malriĉulo? Ĉu vi ne aŭdas mian peton?"

Fine la dio ne povis ne cedi al la fervora preĝo. Li aperis antaŭ Gunadhar en homa formo kaj diris: "Ho, Gunadhar, mi estas tre kontenta kun via preĝado. Do, kial vi vokis min? Kio estas via deziro?"

Kiam Gunadhar aŭdis tiujn vortojn, li tuj malfermis siajn okulojn kaj vidante la dion li salutis lin kaj diris: "Ho, Gvidanto de la homa sorto, mi salutas vin. Mi nur petas al vi, ke vi forigu mian malriĉecon."

"Ho jes, mi donas al vi tiun senenhavan poton, kiu forigos vian malriĉecon. Jen ĝi estas! Sed ne turnu la poton pli frue ol post la reveno en vian hejmon!" La dio transdonis la poton kaj subite malaperis en la aeron.

Gunadhar prenis la poton kaj denove salutis la nevideblan dian potenculon. Sed la afero iom surprizis lin. Kial estas la poto senenhava? Tamen pro la dia ordono li ne turnis la poton. Tre kontenta li reiris hejmen. Nun li pensis pri sia edzino. Certe ŝi miros, kiam ŝi aŭdos pri la afero.

Sed survoje li denove ekpensis pri la mistera ordono de la dio. Li ne povis rezisti al la tento. Subite li turnis la poton, kaj

— de la poto falis seninterrompe rizmanĝaĵoj. La tre bonaodoro de la manĝaĵoj ĉirkaŭis la tutan lokon. "Ho, estas mirinde!" Gunadhar diris al si mem, kaj poste li ree turnis la poton. La rizfalado finiĝis. Kial la dio ne permesis al li turni la poton?

Estis tre varma somera tago. Survoje li trovis belan lagon, kaj tie li volis bani sin. Proksime estis vilaĝo. Li nun unue iris en la vilaĝan bazon. Tie li petis vendiston konservi la poton, ĝis kiam li revenos. La vendisto konsentis. Poste Gunadhar foriris por bani sin en la lago.

Dume la vendisto volis meti la poton en sekuran lokon, por ke ĝi ne rompiĝu. Sed kiam li prenis ĝin en la manon kaj nevole turnis ĝin, tuj ekfalas rizoj tre bonodoraj el ĝi. "Kio estas tio?" surprizite kriis la vendisto. La rizoj falis senfine. La vendisto tuj komprenis, ke tia poto certe estas donaco de dio. Alie io tia ne povus okazi. La poto tentis lin multe. Li faligis multege da rizoj kaj plenigis ĉiujn ujojn, kiujn li havis en sia hejmo. Poste li pensis: "Ho, certe mi mem devas havi la poton. Estus tre bona komerco — sen kapitalo!"

Post bano Gunadhar revenis al la vendisto por rehavi sian poton. Sed kiam li petis ĝin, la vendisto tre surprizite respondis: "Via poto? Kiu poto? Mi scias nenion pri via poto."

"Ho, kion vi diras? Mi ja metis mian poton ĉi tien, en vian butikon, laŭ via konsento antaŭ unu horo," kun granda mir-ego diris Gunadhar.

"Ho, vi estas trompisto! Foriru, foriru tuj! Alie mi vokos la policiston!" minacis la vendisto.

Gunadhar sentis sin tute senhelpa kaj povis fari nenion kontraŭ la vendisto. Kun granda malĝojo li reiris al la profunda arbaro. Kaj tie, ferminte siajn okulojn, li denove komencis

preĝi al la potenca dio. La dio reaperis en homa formo antaŭ li kaj demandis: "Ho, kial vi ree vokis min? Kio estas via deziro?"

Aŭdante la voĉon de la dio Gunadhar malfermis siajn okulojn, salutis kaj diris: "Ĉioscia dio, certe vi konas la kaŭzon. Vendisto trompis min kaj prenis vian donacon."

"Ĉu vere? Nu, jen estas alia poto!" La dio donis al li novan samspecan poton kaj poste tuj malaperis.

Gunadhar denove fariĝis tre ĝoja kaj ree ekiris hejmen. Ĉi tiun fojon la dio diris nenion pri la turnado de la poto. Tial li scivoleme turnis ĝin. Sed estis mirinde! El la poto falis estaĵoj, kiuj rapidege kreskis, fariĝis gigantoj kaj komencis bati Gunadharon. Li tuj returnis la poton, kaj la gigantoj samtempe eniĝis en ĝin. Nun Gunadhar komprenis la signifon de la dia donaco. Li iris rekte al la sama bazaro kaj donis la poton sub gardo de la sama vendisto. Ankaŭ nun li diris, ke li baldaŭ revenos kaj prenos ĝin.

La vendisto antaŭ si vidante la saman homon kun samspeca poto tre miriĝis, sed diris nenion kaj prenis la poton sub gardo. Gunadhar foriris por bani sin.

Kiam li estis for, la vendisto tre scivoleme turnis la poton. Sed anstataŭ rizoj elfalis giganto post giganto el la poto, kaj la gigantoj komencis bati lin. Pro la seninterrompa batado de la gigantoj la vendisto tute forgesis returni la poton. De la turnita poto venis senĉese novaj gigantoj, kaj la tuta vendejo pleniĝis. Ĉiuj gigantoj batadis kaj batadis la vendiston, kaj tiu ĉi kriegis pro doloro. Multaj homoj kolektiĝis antaŭ la vendejo, sed ekvidinte la gigantojn ili rapidege forkuris de tie. Estas ja mirindega afero!

Dume Gunadhar revenis. Kaj kiam li vidis la aferon, li tuj returnis la poton, kaj la gigantoj momente eniĝis.

Kun tre trankvila voĉo Gunadhar demandis: "Nu, ĉu vi nun estas sufiĉe saĝa? Do, redonu ankaŭ la alian poton!" La vendisto petis pardonon kaj tuj redonis ĝin.

Kun ambaŭ donacoj de la dio Gunadhar venis hejmen. La edzino miregis vidante la potojn kaj aŭdinte la tutan historion. De tiu tago ilia sorto tute ŝanĝiĝis.

Nun Gunadhar estas la plej feliĉa homo en la mondo kaj tre konata en sia lando kiel riĉegulo.

Fakiro kaj princo

Iufoje estis reĝo. Li havis du reĝinojn, nome Suorani kaj Duorani. En lia reĝlando ĉiuj estis prosperaj. Ankaŭ la reĝo mem estis tre feliĉa. Nur unu mankis al la reĝo. Li havis nek filon nek filinon. Tamen tempo ne staras. La saĝaj homoj en la reĝlando ĝemis kaj pensis pri la estonteco de la reĝa familio. Estas tute malluma la estonto! Kiu sidos sur la trono de la reĝo poste?

Someran tagon venis al la palaco fakiro kaj petis almozojn. Suorani elvenis al la fakiro havante almozojn en la mano por doni al li.

”Patrino, via filo vivu longe kun sama gloro kiel nia reĝo,” benis la fakiro. Aŭdinte tiun benon Suorani ruĝiĝis kaj ruĝiĝis kaj poste diris: ”Ho, sanktulo, via beno estas senvalora.”

”Ho, reĝino, ĉu vi ne havas infanon? Do, tiam mi ne povas akcepti vian donacon. La sanktuloj ne rajtas akcepti donacon de virino, kiu ne havas infanon. Tamen mi benas vin, ke vi baldaŭ havu filon, kiu naskiĝos kun grandaj reĝaj kvalitoj. Sed la vivo de via filo rilatos al sekreto. En la tre bela lago antaŭ la palaco ekzistas granda ruhit-fiŝo*. Kaj en la fiŝo ekzistas ora girlando kaj ĝi estos la vivsekreto de via filo,” diris la fakiro kaj foriris.

Neniu alia aŭdis pri tiu afero. Nur Suorani estis pli gaja ol antaŭe pensante, ke fine ŝi estos patrino de princo.

* En Bengalujo unuspeca granda fiŝo nomiĝas ”ruhit”.

Post unu jaro naskiĝis la filo de la reĝo. La reĝo nun estis senfine ĝoja. Ĉar fine li estis patro! Ne nur tra la reĝa palaco, sed tra la tuta reĝlando kvazaŭ pasis vento de ĝojo.

Post unu monato venis la nomtago de la reĝa filo. Estis granda festeno. Tiel granda festeno antaŭe neniam okazis en tiu reĝlando. La reĝo disdonigis oranĝojn al ĉiuj homoj en la reĝlando. Kaj de tiu tago oni nomis la filon Aĝitkumar.

Aĝitkumar nun tiel kreskas en la sino de reĝa komforto kiel nova luno kreskas en la ĉielo printempa. La reĝo estas tre ĝoja kaj Suorani aŭkaŭ same ĝoja, ĉar fine ŝi estas patrino. La tagoj pasas feliĉe. Estas en la reĝlando nur unu homo, kiu estas tre malgaja kaj pli malfeliĉa ol antaŭe, nome Duorani, la alia edzino de la reĝo. Vi komprenas la kaŭzon. Post la naskiĝo de Aĝitkumar ŝi estas iom flankenigita de la reĝo. Al ŝi tio estas tre grava, ne tolerebla. Ŝia sento iom post iom fariĝas pli forta rilate al tiu afero kaj ŝi nun eĉ ne povas vidi Aĝitkumar. Ĉar li estas la sola kaŭzo al ŝia malaltiĝo. Nun ŝi komencas pensi pri rimedo. Ŝi aŭdis iun flustron pri la sekreto de la vivo de Aĝitkumar. Sed nenion ŝi scias precize.

Aĝitkumar, la malgranda ĉarma knabo, estas granda amanto de kolomboj. Kaj li havas du kolombojn. Unu tagon la kolomboj flugas en la ĉambron de Duorani. Kiam Duorani vidas la kolombojn de Aĝitkumar, ŝi volas kapti la okazon por realigi sian celon. Ŝi kaptas la birdojn. Aĝitkumar nevidante siajn birdojn serĉas kaj serĉas kaj fine venas en la ĉambron de sia duonpatrino.

Kaj vidante la birdojn en la mano de Duorani, li petas ilin de ŝi. Duorani ne volas tion kaj diras kun nekontenta voĉo: "Viaj birdoj multe ĝenas min, Aĝit."

”Ne, *mamma** , ili ne venos al vi denove. Mi prizorgos la birdojn,” diris Aĝitkumar.

”Jes, mi donos ilin al vi; sed ĉu vi povas promesi pri iu afero?” demandis Duorani.

”Kion vi volas de mi, *mamma*? Kion mi devus promesi al vi?” respondis Aĝit surprizita.

”Do, iru al via patrino kaj demandu pri la sekreto de via vivo, sed promesu, ke vi neniam kaj al neniu mencios pri mia demando,” diras Duorani.

”Ho, nur tion, tio estas tre facila. Mi tuj iros al mia patrino,” respondis Aĝit.

Nun Aĝit estas tre ĝoja rehavinte siajn birdojn. Kaj kun la birdoj li rekte iras al la ĉambro de sia patrino. De ekstere li jam vokas: ”*Mamma, mamma*”. Aŭdante la voĉon de Aĝit, Suorani tuj venas eksteren kaj ĉirkaŭprenas la filon kisante lin kun patrina amo. Subite Aĝit demandas al la patrino: ”*Mamma*, mi aŭdis, ke mia vivo rilatas al iu sekreto. Ĉu vere? Mi volas aŭdi pli pri tio.”

”Kiu diris tion al vi?”

La vizaĝo de Suorani subite fariĝas tre pala.

”Ho, *mamma*, mi nur aŭdis tion kaj mi volas nepre koni la aferon.”

”Estu cindroj en la buŝoj de niaj malamikoj! Ho Dio, savu mian filon!” la reĝino parolas por si mem kaj ĉirkaŭprenas forte la filon, timante venontan danĝeron.

Sed Aĝit nepre volas aŭdi pri la afero. Alie li ne manĝos. Tiam en fatala momento la patrino rakontas al la filo la sekreton de lia vivo: pri la fakiro, pri la girlando, kiu ekzistas en la granda ruhit-fiŝo en la lago antaŭ la palaco.

* *mamma*, hinda intima vorto por *panjo*.

Aĝit, laŭ promeso rerakontis al Duorani, kion li aŭdis de sia patrino. Nun Duorani pensadis ĉiumomente, kiamaniere ŝi povus utiligi tiun sekreton.

Aĝitkumar estis la sola kaŭzo al ŝia malfavora sorto.

Post longa pensado unutage ŝi invitis al si la kuraciston de la reĝa familio. Longan tempon ŝi interparolis kun li sekrete kaj fine ŝi petis lian helpon. Se ŝi sukcesos, ŝi donos multege da mono al la kuracisto.

Monavido malbonigas eĉ bonan homon. Do, tentita de la mono, la kuracisto promesis helpi. Li konsilis al ŝi, ke ŝi kuŝu en lito farita kun sekaj jutbranĉoj. Ŝi diru, ke ŝi havas grandan doloron en la tuta korpo. Laŭ la konsilo nun ĉio estas preparita. En la sekvinta mateno venis la novaĵo al la reĝo, ke Duorani estas tre malsana.

La reĝo iris por viziti ŝin.

Ankaŭ la kuracisto estis vokita. Ĉu estas tre danĝera malsano? Duorani montras sin tre maltrankvila pro la malsano. Pro ŝiaj maltrankvilaj movoj la kaŝitaj sekaj jutbranĉoj faris sonon, kaj la kuracisto diris al la reĝo, ke tiu sono estas de la ostoj en la korpo de la reĝino. La kuracisto tre zorge ekzamenis la pacienton kaj poste deklaris, ke tiu malsano preskaŭ ne estas kuracebla. Nur unu rimedo ekzistas: oleo de ruhit-fiŝo.

”Tio estas tre facile havebla. En la lago antaŭ la palaco ekzistas tia fiŝo. Ordonu al miaj fiŝkaptistoj, ke ili kaptu ĝin,” diris la reĝo.

Nun la fiŝkaptistoj venis al la lago por kapti la ruhit-fiŝon. Samtempe Aĝit estis tre okupata per ludoj kun siaj kamaradoj en la alia flanko de la lago. Kiam la fiŝkaptistoj kaptis la ruhit-fiŝon per reto, subite Aĝit falis sur la teron kaj fariĝis

senkonscia. Kreiĝis granda sensacio. La novaĵo venis al la gepatroj. Oni portis Aĝiton en la palacon.

Dume la kaptita fiŝo estis portita al la ĉambro de Duorani. Kaj tie la kuracisto mortigis la fiŝon. Kiam li tranĉis la fiŝon, li trovis la oran girlandon. Li transdonis ĝin al Duorani kaj ŝi metis ĝin sur sian kolon kiel ornamaĵon.

En tiu momento Aĝit mortis. Estis granda malĝojo, ne nur por Suorani kaj por la reĝo, sed por la popolo de la tuta reĝlando. La reĝo havis apartan domegon en granda parko kaj en tiun domon oni metis la senvivan korpon de la kara reĝa filo Aĝitkumar. Poste multaj jaroj pasis.

*

En la ĉielo la fratino de Bidhatapuruso* havis belegan filinon, kaj la diino estis tre scivolema aŭdi de Bidhatapuruso pri la sorto de sia filino. Iun tagon ŝi venis al sia frato kaj demandis: "Ho, mia frato, ho gvidanto de homa sorto, diru al mi — kun kiu mia filino edziniĝos? Kio estas ŝia sorto?" Bidhatapuruso ne volis respondi tiun demandon. Sed pro la scivolemo de sia fratino, li devis respondi. "Estas bedaŭrinde, sed via treege bela filino edziniĝos al mortinto," respondis Bidhatapuruso.

"Al kiu? Al mortinto? Ĉu tio povas esti vera?" la diino kriis.

"Mi ne povas helpi. Tamen estas tiel," respondis Bidhatapuruso denove.

Aŭdinte la sorton de sia filino, la diino preskaŭ fariĝis mal-

* En malnova hinda popola mito ekzistas tiu koncepto. *Bidhatapuruso* signifas Dion kun boma formo, kiu loĝas en sia ĉiela domo.

sana. Ŝi decidis transloĝiĝi de la ĉielo al la tera mondo kune kun sia sola filino.

Iun tagon ili ekvojaĝis. Ili trapasis multajn vilaĝojn, multajn arbarojn. Estis somera tago. La filino fariĝis tre soifa pro la varmo. La patrino pensis, ke estas pli bone peni por atingi la jam videblan urbon por tie ricevi puran kaj freŝan akvon. Ili rapide promenadis. Baldaŭ survoje ili renkontis belan parkon. En la parko staris treege bela domo. Sed neniu homo estis tie. La patrino diris al la filino, ke ŝi restu en la ombro de la arboj. Kaj ŝi mem iros al la proksima vilaĝo por havigi akvon.

Nun la patrino foriris. La filino estis sola. La trankvila senhomeco de la loko kaj de la domo iom surprizis ŝin. Scivoleme ŝi iris al la domo kaj iom puŝis la pordon de la domo. La pordo tuj malfermiĝis. Ŝi eniris la ĉambron. Treege bela ĉambro, sed ne estis homoj. Tio ŝajnis al ŝi tre mistera.

Ŝi trapasis ĉambron post ĉambro. Tiel belajn ĉambrojn ŝi antaŭe neniam vidis. Ĉiuspecaj manĝaĵoj tie ekzistis. Ĉiuj objektoj estis tre delikate aranĝitaj. Subite en unu ĉambro ŝi trovis dormantan viron. La unua vido teruris ŝin. Sed poste iom pli kuraĝe ŝi iris apud la liton de la dormanta viro. Ho, kio estas tio? Estas mortinto Sed la korpo estas tiel freŝa! Ŝi volis kribri, sed la terurego sufokis ŝian voĉon.

Dume la patrino revenis kun akvo al la parko, kie ŝi lasis sian filinon. Sed kie ŝi estas? La patrino serĉis kaj serĉis en la ĉirkaŭaĵo, sed ne trovis ŝin. Tiam la diino kredis, ke certe la filino foriris al iu najbara loko por havigi trinkaĵon. Samtempe venis la nokta mallumo. Por trovi sian filinon ŝi rapidis for de la parko.

Sed en la nokto vekiĝis la viro dormanta en la palaca ĉambro. Li mem lumigis la ĉambron. Ĝis tiam la junulino eĉ ne

povis paroli. Nun ŝi de la flanko de la ĉambro vidis, ke tio estas treege bela junulo.

Ho, mia kara leganto, ĉu vi povas diveni, kiu estas tiu viro? Li estas Aĝitkumar, la mortinta filo de la reĝo. En la lumigita ĉambro Aĝit subite ekvidis la belulinon.

”Kiu estas vi? Kial vi estas ĉi tie?” li demandis surprizita.

Nun ŝi komencis kuraĝe rakonti la tutan historion de sia vivo.

”Mia patrino demandis al sia frato Bidhatapuruso, la gvindanto de homa sorto, pri mia estonteco. Kaj li respondis, ke mi edziĝos al mortinto. Pro tio mia patrino foriris kune kun mi de la ĉiela domo al la tera mondo.” Poste ŝi ankaŭ rakontis kiamaniere ŝi envenis la ĉambron.

Aŭdinte la tutan rakonton de la belulino, Aĝitkumar subite diris: ”Mi estas via mortinta edzo, certe mi estas.” Kaj poste li komencis rakonti la historion pri sia propra vivo, pri sia naskiĝo, pri la fakiro kaj la vivsekreto, la girlando en ruĥifîŝo, pri la ĵaluzo de la duonpatrino Duorani kaj pri la kaŭzo de sia morto. Poste li finis dirante, ke kiam Duorani uzas tiun girlandon dum la tago, tiam li estas senviva. Sed dum la nokto, kiam Duorani ne uzas ĝin, tiam li estas vivanta.

La tuta historio treege mirigis ŝin. Nun ŝi ankaŭ pensis pri la profetaĵo de Bidhatapuruso. Certe la junulo estos ŝia edzo! Estas la certa signifo de la vortoj de Bidhatapuruso. Ŝia mola koro pleniĝis de kompatato. Samtempe ŝi fariĝis tre kolera al Duorani. ”Kiamaniere oni povas havigi tiun girlandon?” ŝi demandis.

Por momento silento regis la ĉambron. Kiamaniere? Ili pensis kaj pensis pri la afero profunde kaj longe. En la fino de la nokto Aĝitkumar diris al la belulino: ”Baldaŭ mateno ve-

nos kaj mi por la tago estos senviva. En la mateno vi iru al mia kara amiko, la filo de ministro, la kamarado de mia infaneco. Nun mi skribos leteron pri la tuta afero, kaj vi portu ĝin al li.”

Mateno venis. Aĝitkumar denove estis senviva. La belulino kun la letero de Aĝitkumar foriris por atingi la reĝan palacon. Ŝi vestis sin kiel kampara almozulino. Fine ŝi venis al la ĉambro de la filo de ministro kaj vidis, ke li estas sola legante. Ŝi envenis kuraĝe la ĉambron kaj metis la leteron sur lian tablon. La filo de ministro surpriziĝis pro la senpermesa enveno de la almozulino. Tamen li prenis la leteron kaj tra legis ĝin. Leginte la leteron, li kun mirego demandis: ”Ĉu mia kara amiko ankoraŭ vivas? Ĉu estas vero?”

La junulino rigardante ĉirkaŭen nur respondis: ”Ne parolu, nur venu nokte al via amiko,” kaj poste ŝi rapide foriris.

La tuta afero ŝajnis treege mirinda kaj mistera al la ministra filo. Li atendis senpacience la nokton, kaj kiam ĝi venis, li iris al la parka palaco, kie lia senviva amiko loĝis. Kia ĝojego por ili sin renkonti! Nun la filo de ministro ekaŭdis ĉion pri Aĝitkumar, kaj cetere pri la alveno de la belulino kaj pri ŝia vivhistorio. La tutan nokton ili parolis pri la girlando, la vivsekreto de Aĝitkumar. Kiamaniere oni povus havigi ĝin?

De tiu tago ĉiunokte la filo de ministro kutime venis tien. La tagoj pasis. Sed neniu alia konis pri tiu mirinda afero. Nur tiuj tri personoj.

En unu nokto okazis la edziĝa festeno inter Aĝitkumar kaj la belulino. Tie la sola gasto estis la filo de la ministro. Li faris ĉion, kion li povis por beligi la festenon. La edziĝa ceremonio estis farita per simpla ŝanĝo de florgirlandoj.

Poste kelkaj jaroj pasis. Aĝitkumar fariĝis patro de du belegaj kaj ĉarmaj filoj. Nun la filo de la ministro diris: ”Iama-

niere ni devas havigi la girlandon.” Sed, kiamaniere? Ili ja pri-
pensis multe, sed senrezulte.

Sed foje iun tagon, kiam Aĝitkumar estis senviva, lia edzi-
no vestita kiel barbirino kaj kun barbiriloj foriris al la reĝa pa-
laco. Ŝi ankaŭ ne forgesis kunpreni siajn filojn. Unue ŝi venis
al la ĉambro de Suorani kaj demandis, ĉu Ŝia Moŝto volas
havi helpon por barbiri siajn ungojn kaj hararon. Suorani re-
spondis, ke ŝi ne havas emon por beligi sin. Sed kiam ŝi vidis
la filojn de la barbirino, tuj en ŝia memoro aperis la figuro de
ŝia morta filo Aĝitkumar, kaj kun ĝemo ŝi diris: ”Ho barbiri-
no, tamen mi estos dankema, se vi vizitos min kelkfoje kune
kun viaj infanoj.”

Poste la barbirino venis al la ĉambro de Duorani kaj diris:
”Ho reĝina Moŝto, ĉu vi deziras havi helpon de barbirino?”

Duorani estis tre amata de la reĝo post la morto de Aĝit-
kumar. Kaj de tiu tempo ŝi estis tre kontenta. Nun kiel aliaj
belulinoj ŝi havis ĉiujn emojn por beligi sin. Ŝi volis havi hel-
pon kaj diris: ”Ho, barbirino, venu morgaŭ je la deka horo”.

”Certe laŭ via Moŝta ordono, morgaŭ ,” respondis la bar-
birino. Poste kune kun siaj infanoj ŝi foriris hejmen. Dum la
interparolo ŝi tre zorge rigardis la girlandon ĉe la kolo de Du-
orani. Dum la nokto ŝi diris nenion al sia edzo pri la aventuro.

En la sekvanta mateno ŝi vestis sin same kiel en la antaŭa
tago. Antaŭ la foriro ŝi instruis al sia unua filo, ke kiam ili es-
tos ĉe Duorani, li kriante petu la girlandon de la reĝino.

Precize je la ĝusta tempo ŝi venis al Duorani. Kaj post sa-
luto ŝi komencis ordigi la longan hararon de Duorani. Subite
la unua filo diris al sia patrino: ”Ho, *mamma*, mi volas havi
la girlandon”.

”Kion vi volas havi?” demandis la barbirino kun riproĉa voĉo.

Denove la filo diris la samon. Li volas havi la girlandon.

”Ree vi diras? Kial vi havas tian deziron, kiam vi estas filo de barbirino malriĉa?” ŝi minace demandis la filon.

Denove, nun kun iom pli alta voĉo, la filo ripetis firme la samon.

La patrino fariĝis kolera. Kaj nun ŝi batis per la mano la filon. Pro tio la knabo komencis krii laŭte.

Duorani iom kompatis lin kaj diris al lia patrino: ”Ne punu lin. Li nur estas knabo”. La knabo konstante kriis. Duorani por momento fariĝis iom distra kaj pensis pri la girlando kaj pri Aĝitkumar. Por si mem ŝi murmuris: ”Aĝit de longe estas for de la mondo. Ne ekzistas danĝero. Tute ne.”

Dume la barbirino diris, denove riproĉante la filon, ke se li krios plu, ŝi batos plu. Sed tio ne helpis. La filo daŭrigis sian infanan krimon.

Nun Duorani ne volis plu, ke la patrino punu lin. Pro tio ŝi diris al la krianta knabo: ”Jes ja mi donos ĝin al vi. Jen vi havas.” Poste Duorani mallaŭte diris al la patrino: ”Kiam via filo dormos, prenu ĝin kaj poste redonu ĝin al mi.”

La barbirino kun multa danko salutis al Duorani kaj diris: ”Certe mi redonos ĝin, ho reĝina Moŝto. Sed vidu, kian malbonan bubon mi havas!” La afero finiĝis tiel. Post la laborado la edzino de Aĝitkumar rapidegis hejmen.

Kiam ŝi venis hejmen, ŝi tuj metis la girlandon sur la kolon de sia dumtage senviva edzo. Aĝitkumar tuj vekiĝis. Ho, kia granda ĝojo estis!

Dum la nokto venis la filo de la ministro kiel kutime. Nun

ĉiuj estas senfine ĝojaj. La filo de la ministro diris al siaj geamikoj, ke ili pretigu sin por viziti la reĝon.

Tiun tagon laŭ la aranĝo de la ministra filo aperis en la palaca parko kvincent elefantoj belege ornamitaj, kaj mil ĉevaloj rajditaj de soldatoj belege vestitaj. Samtempe letero venis al la reĝo, ke lia filo Aĝitkumar kune kun sia familio baldaŭ venos al la gepatroj por viziti ilin. La reĝo legis la leteron alportitan de la ministra filo. Sed unue li tute ne komprenis la aferon.

”Ĉu estas songo!” murmuris la reĝo. La filo de la ministro nun rakontis al la reĝo la tutan historion. Neatendita ĝojo plenigis la koron de la reĝo. Por momento lia vizaĝo fariĝis malluma, kiam li aŭdis pri la konspiro de Duorani. — Baldaŭ Suorani ankaŭ ekaŭdis la novajon. Estis grandega ĝojo por ŝi, ke fine ŝi denove vidos sian karan filon.

En la fino de la tago alvenis Aĝitkumar kun siaj edzino kaj du filoj rajdante sur elefantoj al la palaco. Post ili sekvis procesio, kiun kun grandioza pompo aranĝis la ministra filo.

La reĝo, Suorani, la ministro, ĉiuj en la palaco elvenis por akcepti ilin. La stranga okazintaĵo fariĝis konata tra la tuta reĝlando. La tuta popolo kolektiĝis en la korto de la palaco. Ĉiuj homoj tre koleris aŭdinte la malbonan kaj aĉan konspiron de Duorani. La reĝo por ĉiam ekzilis ŝin el la lando.

* * *

*

La infano aŭskultas kun granda intereso la fabelon de sia avino.

”Kio okazis poste?” li demandas.

”La reĝo estis tre maljuna kaj ne volis esti plu reĝo. Li si-

digis la filon, Aĝitkumar, sur la tronon por reĝi kaj mem foriris al arbaro por pasigi sia lastan tempon dum silenta meditado,” diris la avino.

*”Estas fina de mia rakonto,
Dormu bone, mia kara infano.”*

Kio estas saĝo?

Li estis fama profesoro en filozofio. Li loĝis en antaŭurbo de la granda kaj antikva urbo Pataliputra, kies moderna nomo estas Patna. Li vivis trankvile en sia domo kaj estis tre okupata per verkado de filozofia libro kaj sia laboro. Ĉiuj rigardis lin kiel tre saĝan homon. Ofte li veturis en la urbon por fari paroladon pri sia filozofio.

Dum tiu tempo ne ekzistis fer- aŭ tramvojoj. La homoj uzis plej multe siajn piedojn, ankaŭ oni tre ofte veturis per boato, se estis rivero proksime. La fama rivero Ganĝo pasas tra la urbo Patna. La hejmo de la profesoro estis sur la alia flanko de Ganĝo sufiĉe malproksime de la urbo. Li havis malgrandan boaton kaj ankaŭ boatiston.

Iun tagon li foriris per sia boato en la urbon por fari prelegon. Kiam li finis sian prelegon, li iris rekte en sian boaton por vojaĝi hejmen. Estis posttagmeze. La boatisto ekpuŝis la boaton kaj remis hejmen. Subite la profesoro demandis al li:

”Ho, boatisto, ĉu vi scias ion pri filozofio?”

”Jes, sinjoro, mi aŭdis la vorton, sed mi ne scias kia objekto estas filozofio.”

”Ah, tiaokaze unu kvarono de via vivo estas vana. Ĉu vi konas ion pri logiko?”

”Ne, sinjoro, sed mi scias, ke logiko estas nur por logikistoj.”

”Ah, do unu duono de via viva estas vana.”

Nun li ree demandis al la boatisto:

”Ĉu vi konas ion pri astronomio?”

”Ne, sinjoro, tute ne.”

”Oh, kiel malriĉa vi estas en la mondo. Tri kvaronoj de via vivo estas por nenio. Estas granda domaĝo.”

La profesoro mediteme rigardis la ĉielon pensante pri la malriĉeco de tiu homo pro la manko de scio. ”Vere tiuj homoj vivas en granda mallumo de la mondo,” murmuris la profesoro por si mem.

La boatisto nur ĝemegis, sed ne parolis plu. Por kelkaj minutoj la profesoro kaj la boatisto ambaŭ silentis. La boatisto remis la boaton kiel ordinare.

Subite la ĉielo mallumiĝis per dikaj nuboj. Ankaŭ forta ventego venis.

Tondro ludis grandege en la ĉielo. La akvo de la rivero forte moviĝis.

La ondoj ĵetiĝis sur la boaton. La profesoro timiĝis. La boatisto demandis al li:

”Ĉu vi povas naĝi, sinjoro?”

La profesoro respondis timeme: ”Ne, ne, boatisto — tute ne. Kion mi faru?”

La boatisto diris: ”Tiam via tuta vivo eble estas tute vana. Kiel mi povus savi vin de tiu tre danĝera torento?”

”Ha, boatisto, kion mi faru nun?” kriis la profesoro pro timo.

Subite tre forta ondo surpasis la boaton kaj subprenis ĝin kun la profesoro en nekonatan lokon sub la granda ri vero. La boatisto saltis el la boato kaj sukcesis savi sin.

Kiu scias? Kio estas saĝo?

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-111-9